TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO
3a KONKURSO PRI PENTRADO POR DULINGVAJ VERKOJ
PREMIO "ANGELO SORANZO" - JARO 2016

Regularo

Art. 1

Partopreno estas senpaga.

La konkurso proponas la temon: **PACO**, kaj la konkurso akceptas verkojn en iu ajn tekniko, escepte de glulaboraĵoj, mozaiko kaj perkomputila grafiko.

Ĉiu verko devas enteni - **sur la pentrita surfaco** - tekston de almenaŭ unu frazo, eĉ se mallonga, rilata al la proponita temo: en esperanto (skribita en verda koloro) kaj ĝia traduko al iu ajn lingvo (skribita en alia ajna koloro).

Ĉiu aŭtoro rajtas partopreni per nur unu ellaboraĵo kun maksimumaj dimensioj: 80x80 cm, inkluzive de la eventuala kadro.

Art. 2

Ĉiu verko devas havi **sur la malantaŭo** la aŭtorajn datumojn kaj la titolon, en iu ajn lingvo. Krome, la pentraĵo estu provizita per taŭgaj iloj por simpla alkroĉado surmura.

Art. 3

La Art-Komisiono, alcele elektita, distribuos la jenajn premiojn:

1-a premio - € 400
2-a premio - € 200
3-a premio - € 100
4-a premio - € 100

Du specialaj premioj por geknaboj ĝis 14 jaroj: po € 50.

Ĉiu partoprenanto ricevos de Triesta Esperanto-Asocio partopren-diplomon.

Art. 4

Triesta Esperanto-Asocio retenos la premiitajn verkojn kaj havos pri ili plenan reproduktorajton.

Art. 5

Enskribiĝo kaj transdono de la pentraĵo okazos ĉe la sidejo de TEA (via del Coroneo 15, 34133 Trieste - 3a etaĝo) en la vendredaj tagoj, ekde la 19a horo ĝis la 20h30, de la aprila, maja, junia, septembra monatoj; aŭ oni sendu ĝin poŝte. La verkoj devas atingi TEA-n **ĝis maksimume la 21a de oktobro 2016**.

Art. 6

La ekspozicio de la konkursontaj verkoj okazos ĉe la TEA-sidejo, aŭ en aliaj ejoj ankoraŭ difinendaj, en **novembro 2016**.

Art. 7

La premio-disdonado okazos **merkredon la 7an de decembro 2016 je la 17a horo**, ĉe la TEA-sidejo.

Art. 8

La nepremiitajn verkojn oni povos preni fine de la premia ceremonio aŭ dum la **vendredoj de januaro 2017**, **ekde la 19a horo ĝis la 20h30**.
Se ĝis la fino de januaro 2017 oni ne kunprenis sian pentraĵon, tiu ĉi iĝos posed-aĵo de TEA, kune kun ties reproduktorajto.

Art. 9

La juĝo de la Art-komisiono estas neapelaciebla kaj nekontestebla.
La Organiza Komitato, kvankam garantiante ordinaran gardadon de la trans-donitaj verkoj, tamen ne respondecas pri ŝteloj kaj/aŭ domaĝoj eventuale okaz-ontaj.
La partopreno en la konkurso antaŭvidas la senrezervajn konon kaj akcepton de la regularo, plus la plenigadon de la enskribiĝilo.

Art. 10

Konforme al la leĝo n. 196/03 pri gardado de personaj donitaĵoj, oni certigas, ke ĉiujn ricevitajn datenojn oni prikonsideros per la pleja diskreteco kaj, en ĉiu momento, la aŭtoro rajtos peti ilian ĝisdatigon, kontrolon aŭ forviŝon.

Art. 11

La Asocio tenas por si la rajton, akcepti aŭ malakcepti la partoprenon de la prezentotaj konkursaĵoj.

———

ASSOCIAZIONE ESPERANTISTA TRIESTINA
Telefono 331-4805706
E-mail: esperantotrieste@yahoo.it, nored@tiscali.it
testudo.ts@gmail.com
http://www.tea1906.altervista.org

Oni atentigas, ke facile troveblas, interrete, vortaroj pri Esperanto, ekzemple ĉe:

http://hvortaro.altervista.org/

http://www.lexicool.com/dictionaries_esperanto.asp?IL=2

Eblas ankaŭ utiligi Google Tradukanto.

Triesta Esperanto-Asocio estas je dispono por eventualaj tradukoj.